PATRINO TEREZA

PREĜOJ KAJ PENSOJ

PATRINO TEREZA: PREĜOJ KAJ PENSOJ

tradukoj:
Antonio De Salvo
3-18; 35

Lucija Borčić
22-29; 33-34

Marija Belošević
19-21; 30-32

Redaktis:
Marija Belošević

Fotoj:
Marija Belošević

titolpaĝo:
Statuo de Patrino Tereza en Zagrebo (Kroatio)

dorspaĝo:
Statuo de Patrino Tereza en la katedralo de Staj
Laŭrenco kaj Elizabeto en Roterdamo (Nederlando)

Eldono preparita okaze de la sanktproklamo de Patrino Tereza, la 4an de septembro 2016

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

AMU LA VIVON TIA, KIA ĜI ESTAS

Amu la vivon tia, kia ĝi estas.
Amu ĝin plene, sen pretendoj;
amu ĝin kiam oni amas vin aŭ kiam oni vin malamas,
amu ĝin kiam neniu vin komprenas,
aŭ kiam ĉiuj komprenas vin.

Amu ĝin kiam ĉiuj vin forlasas,
aŭ kiam oni altigas vin kvazaŭ reĝon.
Amu ĝin kiam oni forŝtelas de vi ĉion,
aŭ kiam oni ĉion donacas al vi.
Amu ĝin kiam ĝi havas sencon
aŭ kiam ŝajnas, ke ĝi havas eĉ ne ereton da tio.

Amu ĝin rn la plena feliĉo,
aŭ en la absoluta soleco.
Amu ĝin kiam vi estas forta,
aŭ kiam vi sentas vin malforta.
Amu ĝin kiam vi havas timon,
aŭ kiam vi havas amason da kuraĝo.
Amu ĝin ne nur pro la grandaj plezuroj
kaj la enormaj kontentigoj;
amu ĝin ankaŭ pro la tre malgrandaj ĝojoj.

Amu ĝin kvankam ĝi ne donas al vi tion kion ĝi povus,
amu ĝin ankaŭ se ĝi ne estas tia kian vi ĝin volus.
Amu ĝin ĉiufoje kiam vi naskiĝas
kaj ĉiufoje kiam vi estas mortonta.
Sed neniam amu sen amo.
Neniam vivu sen vivo!

VI, MIA LUMO...

Por ke tiuj kiuj rigardas min
ne vidu mian personon,
sed Vin en mi,
restu kun mi.
Tiel mi brilegos el Via brilego
kaj povos esti lumo por la aliaj.
Mia lumo venos nur de Vi, Jesuo,
estos mia eĉ ne unu malgrada radio.
Estos Vi tiu, kiu lumigos la aliajn pere de mi.
Inspiru al mi la laŭdon kiun Vi plej ŝatas,
prilumante la aliajn ĉirkaŭ mi.
Mi Vin anoncu
ne per la vortoj sed per la ekzemplo,
per la atesto de miaj faroj
per la videbla elano de la amo
kiun mia koro ricevas de Vi.
Amen.

*

Sinjoro Jesuo,
kiu kreis kun amo,
naskiĝis kun amo,
servis kun amo,
agadis kun amo,
estis honorata kun amo,
suferis kun amo,
mortis kun amo,
resurektis kun amo,
mi dankas Vin
pro Via amo al mi
kaj al la tuta mondo,
kaj ĉiutage mi petas de Vi:
instruu ankaŭ al mi ami!
Amen.

*

Ni estas faritaj por forveturi,
por serĉi ĉiam la fonton.
Por vivi vojaĝe,
kiel pilgrimantoj kaj kiel filoj
kiuj senĉese
sin metas je la sekvado,
je la lernejo de Jesuo,
kaj kiuj... atiginte iun punkton...
travivas la penson
kiujn ili skribis ĝis tie,
nur kiel enkondukon
al la verkotasko...
kaj alineas...
por daŭrigi la historion!

INSTRUU AL MI LA AMON!

Sinjoro, instruu al mi ne paroli
kiel tintanta bronzaĵo
aŭ sonanta cimbalo,
sed kun Amo.

Igu min kapabla kompreni
kaj donu al mi la fidon kiu formovas la montojn,
sed kun la Amo.

Instruu al mi tiun amon kiu estas ĉiam pacienca
kaj ĉiam afabla:
neniam ĵaluza, aroganta, egoisma aŭ ofendiĝema;
la amon kiu sentas ĝojon en la vero,
ĉiam pretan pardoni,
kredi, esperi kaj toleri.

Fine, kiam ĉiuj finohavaj aĵoj
dissolviĝos
kaj ĉio estos klara,
mi povu esti estinta la malforta sed konstanta
reflekto de via perfekta amo.

FORVIŜU, INFANO JESUO

Forviŝu, Infano Jesuo,
la larmojn de la infanoj!

Puŝu la homojn demeti la armilojn
kaj kunpremiĝi en universala
BRAKUMO de paco!

Invitu la popolojn, mizerikorda Jesuo,
malkonstrui la murojn kreitajn
de la mizero kaj de la senlaboreco,
de la nescio kaj de la indiferento,
de la diskriminacio kaj de la maltoleremo.

Estas Vi, ho Dia Infano de Betlehemo,
tiu kiu savas nin, liberigante nin el la pekoj.
Estas Vi la vera kaj ununura Savanto,
kiun la homaro ofte palpeserĉas.

Dio de la paco,
donaco de paco por la tuta homaro,
venu vivi en la koro de ĉiu homo
kaj de ĉiu familio.

Estu Vi nia paco kaj nia ĝojo!
Amen!

MI SENTIS LA BATADON DE VIA KORO

Mi Vin trovis en multaj lokoj, Sinjoro.
Mi sentis la batadon de via koro
en la perfekta kvieto de la kampoj,
en la malluma tabernaklo de malplena katedralo,
en la unueco de koro kaj de menso
de kunveno de homoj kiuj amas Vin.

Mi Vin trovis en la ĝojo,
kie mi Vin serĉas kaj ofte trovas.
Sed ĉiam mi Vin trovas en la sufero.
La sufero estas kiel la bato de sonorilo
kiu vokas la edzinon de Dio al preĝado.
Sinjoro, mi Vin trovis en la terura grandeco
de la sufero de la aliaj.

Mi vidis Vin en la elstarega akcepto
kaj en la neklarigeba ĝojo
de tiuj, kies vivo estas turmentata de la doloro.
Sed mi ne sukcesis Vin trovi
en miaj malgrandaj malbonoj kaj en miaj banalaj
ĉagrenoj.

En mia penado
mi lasis ke pasu senutile
la dramo de via elaĉeta pasiono,
kaj la ĝojoplena vigleco de via Pasko estas sufokita
de la grizeco de mia memkompato.
Sinjoro, mi kredas. Sed Vi helpu mian fidon.

EN MOMENTO DE HONESTECO

Sinjoro, kiam mi opinias,
ke mia koro estas elverŝema je amo
kaj mi ekvidas,
en momento de honesteco,
ke mi amas min mem en la amato,
liberigu min de mi mem.

Sinjoro, kiam mi opinias,
ke mi donis ĉion donendan,
kaj mi ekvidas,
en momento de honesteco,
ke estas mi tiu kiu ricevas,
liberigu min de mi mem.

Sinjoro, kiam mi estas konvinkita,
ke mi estas malriĉa,
kaj mi ekvidas,
en momento de honesteco,
ke mi riĉas je orgojlo kaj enviemo,
liberigu min de mi mem.

Kaj, Sinjoro, kiam la regno de la ĉieloj
mise konfuziĝas kun la regnoj de ĉi tiu mondo,
faru, ke mi trovu feliĉon kaj konsolon
nur en Vi.

BONECO

Neniam permesu
ke iu venas al vi
kaj foriras ne estante
pli bona kaj pli kontenta.
Estu la esprimo
de la boneco de Dio.

Boneco sur via vizaĝo
kaj en viaj okuloj.

Boneco en via rideto
kaj en via saluto.
Al la infanoj, al la malriĉuloj,
kaj al ĉiuj kiuj suferas
en la karno kaj en la spirito,
proponu ĉiam gajan rideton.

Donu al ili
ne nur viajn zorgojn
sed ankaŭ vian koron.

RADIOJ DE LA AMO DE DIO

Helpu min disvastigi ĉien vian parfumon, ho Jesuo.
Ĉien ajn mi iras.
Inundu mian animon per via Spirito kaj per via vivo.
Fariĝu mastro de mia esto en tile kompleta maniero,
ke mia tuta vivo estu disradiado el la via.
Por ke ĉiu animo kiun mi alpaŝas povu senti vian
ĉeeston en mi.
Por ke rigardante min ĝi vidu ne min, sed Vin en mi.
Restu en mi.
Tiel mi brilegos el via sama brilego kaj povos esti lumo
por la aliaj.

MALFERMU NIAJN OKULOJN

Malfermu niajn okulojn, Sinjoro,
por ke ni povu vidi Vin en niaj gefratoj.
Malfermu niajn orelojn, Sinjoro,
por ke ni povu aŭdi la vokojn
de tiuj kiuj havas malsaton, malvarmon, timon,
kaj estas subprematoj.
Malfermu nian koron, Sinjoro,
por ke ni lernu ami nin reciproke samkiel Vi amas nin.
Donacu al ni denove vian Spiriton, Sinjoro,
por ke ni fariĝu unu nura koro kaj unu nura animo,
en via nomo. Amen.

ĈU VI VOLAS NIAJN MANOJN?

Sinjoro, ĉu vi volas miajn manojn por pasigi ĉi tiun tagon helpante la malriĉulojn kaj la malsanulojn kiuj tion bezonas?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi miajn manojn.

Sinjoro, ĉu vi volas miajn piedojn por pasigi ĉi tiun tagon vizitante tiujn kiuj bezonas amikon?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi miajn piedojn.

Sinjoro, ĉu vi volas mian voĉon por pasigi ĉi tiun tagon parolante kun tiuj kiuj bezonas amajn vortojn?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi mian voĉon.

Sinjoro, ĉu vi volas mian koron por pasigi ĉi tiun tagon amante ĉiun homon nur pro tio ke li estas homo?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi mian koron.

SENDU AL MI IUN POR AMI

Sinjoro, kiam mi malsatas,
donu al mi iun kiu bezonas nutraĵon;
kiam mi soifas,
sendu al mi iun kiu bezonas trinkaĵon;
kiam mi sentas malvarmon,
sendu al mi iun por varmigi;
kiam mi havas ĉagrenon,
proponu al mi iun por konsoli;
kiam mia kruco fariĝas peza,
igu min kundividi la krucon de alia;
kiam mi estas malriĉa,
gvidu min al iu kiu estas en bezono;
kiam mi ne havas tempon,
donu al mi iun kiun mi povu helpi dum
kelkaj momentoj;
kiam mi estas humiligita,
faru ke mi havu iun por laŭdi;
kiam mi estas senkuraĝiĝinta,
sendu al mi iun por kuraĝigi;
kiam mi bezonas la komprenemon de la aliaj,
donu al mi iun kiu bezonas la mian;
kiam mi bezonas ke oni okupiĝu pri mi,
sendu al mi iun por prizorgi;
kiam mi zorgas nur pri mi mem,
altiru mian atenton al alia persono.

DUDEKKVAR DEMANDOJ
KAJ DUDEKKVAR RESPONDOJ

La plej bela tago?	*Hodiaŭ.*
La plej granda obstaklo?	*La timo.*
La plej facila afero?	*Erari.*
La plej granda eraro?	*Rezigni.*
La radiko de ĉiuj malbonoj?	*Egoismo.*
La plej bona amuziĝo?	*Laboro.*
La plej malbona malvenko?	*Senkuraĝiĝo.*
La plej bonaj profesiuloj?	*Infanoj.*
La unua bezono?	*Komuniki.*
La plej granda feliĉo?	*Esti utilaj al la aliaj.*
La plej granda mistero?	*La morto.*
La plej malbona malvirto?	*Mishumoro.*
La plej danĝera persono?	*Tiu kiu mensogas.*
La plej malbela sento?	*Rankoro.*
La plej bela donaco?	*Pardono.*
Tiu nemankipova?	*Familio.*
La plej bona itinero?	*La ĝusta vojo.*
La plej plaĉa sento?	*La interna paco.*
La plej bona akcepto?	*Rideto.*
La plej bona kuracilo?	*Optimismo.*
La plej granda kontentiĝo?	*La plenumita devo.*
La plej granda forto?	*La fido.*
La plej necesaj personoj?	*Pastroj.*
La plej bela afero en la mondo?	*Amo.*

KIU ESTAS JESUO POR MI

La Vorto fariĝinta karno.
La pano de vivo.
La viktimo kiu oferas sin sur la kruco pro niaj pekoj.
La forofero fordonata en la sankta meso
pro la pekoj de l' mondo kaj miaj personaj.
La vorto kiun mi devas diri.
La vojo kiun mi devas laŭiri.
La lumon kiun mi devas ekbruligi.
La vivo kiun mi devas travivi.
La amo kiu devas esti amata.
La ĝojo kiun ni devas kundividi.
La ofero kiun ni devas oferi.
La paco kiun ni devas semi.
La pano de vivo kiun ni devas manĝi.
La malsatulo kiun ni devas satigi.
La soifanto kiun ni devas sensoifigi.
La nudulo kiun ni devas vesti.
La senhejmulo al kiu mi devas proponi ŝirmejon.
La solulo al kiu ni devas havigi kunulecon.
La neatendito kiun ni devas akcepti.
La leprulo kies vundojn ni devas lavi.
La almozulo kiun ni devas sukuri.
La drinkemulo kiun ni devas aŭskulti.
La invalido kiun ni devas helpi.
La novnaskito kiun ni devas akcepti.
La blindulo kiun ni devas gvidi.
La mutulo al kiu ni devas pruntedoni nian voĉon.
La kriplulo kiun ni devas helpi en piedirado.

La prostituitino kiun ni devas malproksimigi el la danĝero
kaj plenigi per nia amikeco.
La malliberulo kiun ni devas viziti.
La pliaĝulo kiun ni devas servi.
Jesuo estas mia Dio.
Jesuo estas mia edzo.
Jesuo estas mia vivo.
Jesuo estas mia ununura amo.
Jesuo estas ĉio por mi.
Jesuo, por mi, estas la unika.

AMU

Amu ĝis tiom, ke ĝi doloras al vi,
kaj se ĝi doloras al vi,
ĝuste pro tio estos plibone.
Kial plendi?
Se vi akceptas la suferon
kaj ĝin oferas al Dio, ĝi havigos al vi ĝojon.
La sufero
estas granda donaco de Dio:
kiu ĝin akceptas,
kiu amas el la tuta koro,
kiu oferas sin mem
konas ĝian valoron.

INVITO AL SANKTECO

Homo estas neracia, egocentra:
ne gravas, amu lin!
Se vi bonfaras,
oni atribuos al vi egoismajn kaŝitajn celojn:
ne gravas, bonfaru!
Se vi realigas viajn celojn
vi trovos malverajn amikojn kaj verajn malamikojn:
ne gravas, realigu ilin!
La bono kiun vi faras estos morgaŭ forgesita:
ne gravas, bonfaru!
Honesteco kaj sincereco igas vin iamaniere vundebla:
ne gravas, estu ĉiam kaj ĉiel sincera kaj honesta!
Tio kion vi konstruis dum jaroj
povas esti detruata en unu momento:
ne gravas, konstruu!
Se vi helpas la homojn, ili ofendiĝos:
ne gravas, helpu ilin!
Donu al la mondo la plejbonon el vi
kaj oni piedfrapos vin:
ne gravas, daŭrigu!

PREĜO AL MARIA

Maria, patrino de Jesuo,
donu al mi vian koron,
tiel belan,
tiel puran,
tiel senmakulan,
tiel plenan je amo kaj humilo:
igu min kapabla ricevi Jesuon
en la pano de la vivo,
ami Lin kiel vi amis Lin
kaj servi Lin sub la malriĉa aspekto
de la plej malriĉa el la malriĉuloj.
Amen.

PREĜO AL MARIA

Ho Maria, Panjo nia,
al vi mi donas kun konfido
la infanojn de la tuta mondo:
la naskiĝantojn,
la mortantojn,
la plorantojn,
la ekridantojn,
la pacpetantojn,
la panpetantojn,
la respektpetantojn,

Al vi mi donas kun konfido
la infanojn
kiuj suferas en la malsanulejoj de la mondo,
kiuj neniam vizitis lernejojn,
kiuj estas dresataj al la milito,
kiuj estas ekspluatataj kiel sklavoj,
kiuj vivas en la stratoj,
kiuj ne konas la Amon de Dio
portitan sur la tero de Via Filo Jesuo,
Amen.

HUMILAJ LITANIOJ

Ĉi tiujn litaniojn verkis Patrino Tereza

Sinjoro, kompatu nin!
Kristo, aŭdu nin!
Kristo, elaŭskultu ni!

Ĉiela Patro, Dio, kompatu nin!
Filo, Elaĉetinto de la mondo, Dio, kompatu nin!
Sankta Spirito, Dio, kompatu nin!
Jesuo, kun milda kaj humila koro,
faru niajn korojn laŭ via koro!

De deziro esti respektataj, savu nin, Jesuo!
De deziro esti amataj, savu nin, Jesuo!
De deziro esti glorataj, savu nin, Jesuo!
De deziro ke esti konsultataj, savu nin, Jesuo!
De deziro esti rekonataj, savu nin, Jesuo!
De deziro esti famaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti humiligitaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti malŝatataj, savu nin, Jesuo!
De timo esti venkitaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti kalumniitaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti forgesitaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti primokitaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti suspektitaj, savu nin, Jesuo!
De timo esti maljuste traktitaj, savu nin, Jesuo!

Ke aliaj estu pli amataj ol ni, donu al ni gracon tion deziri, Jesuo!
Ke aliaj estu pli estimataj ol ni, donu al ni gracon tion deziri, Jesuo!
Ke aliaj estu elektitaj, kaj ni flanken lasitaj, donu al ni gracon tion deziri, Jesuo!
Ke aliaj estu pli laŭdataj, kaj ni nerimarkitaj, donu al ni gracon tion deziri, Jesuo!
Ke en okuloj de la mondo kresku la aliaj, kaj ni malgrandiĝu, donu al ni gracon tion deziri, Jesuo!
Ke aliaj havu privilegion antaŭ ni pri ĉio, donu al ni gracon tion deziri, Jesuo!
Ke aliaj iĝu pli sanktaj ol ni, kaj ke tio nin igu sanktaj laŭeble, donu al ni tiun gracon, Jesuo!

Ŝafido de Dio, kiu forigas la pekojn de l' mondo, indulgu nin, Sinjoro.
Ŝafido de Dio, kiu forigas la pekojn de l' mondo, elaŭdu nin, Sinjoro.
Ŝafido de Dio, kiu forigas la pekojn de l' mondo, kompatu nin, Sinjoro.

Ni preĝu.
Sinjoro Jesuo Kristo, kiu diris: "Petu kaj vi ricevos, serĉu kaj vi trovos, frapu kaj oni malfermos al vi!" donu al ni, ni porpreĝas Vin, Dian amon, plenkore kaj plenbuŝe kaj age ami Vin kaj neniam Vin ĉesu laŭdi.

Donu al ni, Sinjoro, ke ni timu Vian Sanktan nomon kaj samtempe ĝin amu, ĉar Vi neniam ĉesas gvidi tiujn kiujn per Via amo Vi fortigas. Kiu vivas kaj regas eterne. Amen.

PREĜO POR INVALIDOJ KAJ PERSONOJ KUN EVOLUAJ MALHELPOJ

Ho, Maria Virgulino, Patrino nia,
Hodiaŭ mi preĝas por invalidoj kaj personoj
kun evoluaj malhelpoj.
Prizorgu ilin, samkiel nur patrino kapablas
zorgi pri siaj infanoj.

Dotu ilin per la taga forto,
ke ankaŭ la nokton ili elteni povu.
Mi petas vin,
al ĉiuj ni donu kuraĝon
akcepti ĉion kion dum la vivo ni akceptis
ne deziras.

Ho, Maria, Patrino kompatema,
donacu al ni ĝojon kaj pacon
kaj igu nin kompati unuj la aliajn
samkiel vi kompatas nin.
Amen.

DANKON PRO LA VETERO

Ho, Disinjoro,
Ni dankas vi por la vetero.
Kiam vi la pluvon faligas,
ni dankas vin.
Kiam la tempeston vi senbridas,
ni fidas vin.
Kiam vi permesas ke l'fridon ni sentu,
ni serĉas la varmon de l'amo via.
Ho, Disinjoro,
Kreinto de l'suno, luno kaj stelaro,
de l' vento, ŝtormo kaj maro,
ni scias ke centre de ĉio estas vi-
kune kun ni.
Dankon pro la vetero,
Disinjoro.
Amen.

DANKON PRO L’ MUZIKO KAJ KANTO

Dankon al vi, Disinjoro,
pro l’donaco kanta:
Kun via ĉeesto
Ni ĝuas mirindan agordon.

Kantante al vi,
ni aŭdas vin per mia kanto.
Haleluja.

Dankon al vi, Disinjoro,
pro l’kantado:
dum kantado estas via muziko.

Kantante al vi,
vi jam partoprenas
en donaco miakanta.
Amen.

DANKON PRO L'BESTOJ ĈIUJ

Dankon al vi, Disinjoro,
Pro l' bestoj ĉiuj:
tigro, urso,
elefant', ĉevalo,
bovin' kaj kaprino.
Vi, Sinjoro, paŝtisto estas kaj ilin nomis:
mia grego.
Dankon pro la birdoj glorkantantaj al vi,
kaj pro la fiŝoj migrantaj tra l'abismoj
kreitaj.

Kiam mi hejmen revenas,
ofte elĉerpita kaj lacega
niahejma hundo min renkonten salutas
per ĝoja bojado
tuŝlekante miajn manojn.
Tiomajn amikojn ĝi havas, Sinjoro.
Amen.

PREĜO POR JUĜISTOJ

Ho, Disinjoro,
Elaŭdu mian preĝon por juĝistoj.
Tiomajn sortojn ili devas priatenti:
Dotu ilin per aŭdeblo aŭdi la ĝustan veron.
Ili devas prijuĝi la juston
kiel la reĝo Salomono:
dotu ilin per saĝo.
Ili devas decidi pri l'jarpunoj
al malbon-farintoj;
dotu ilin per espero,
por ne senesperigi la kondamnotojn.
Vi, Disinjoro, Jesuo Kristo,
kiu estas kaj eterne restas la plej granda
inter la juĝistoj,
de la oka mondotago,
pardonu niajn pekojn
kaj nin sukcese enkonduku en la domon de l'Patro.
Amen.

PREĜO POR SOLDATO MILITANTA

Ho, Disinjoro mia,
mi direktas al vi miajn preĝojn por soldato.
Donu al li forton por defendi kaj protekti,
ke la homojn prirespondecajn
ne trafu ajna malbono.
Vian amon al li donacu,
inspiru lin per via Spirito
por ne mortigi, kaj ne detrui,
ne vastigi la malbonon.
Disinjoro, tuŝu la korojn de l'homoj
alvokantaj la homojn militi,
ke ili konsciu ke via paco plej belas,
plej gloras kaj plej venko-kapablas
ol ĉiuj militoj.
Amen.

PREĜO POST LA MANĜO

Jen ni antaŭ vi, Patro ĉiela.
Ni deziras rekonfesi nian ŝuldon de estimo kaj inklino.
Samkiel ĉi tagon ni kun vi komencis,
tiel ĝin kun vi ni volas daŭrigi.
Vi estas centre de ĉio.
De vi ni petas subtenon kaj ripozon.
Ekster vi ni ne serĉas alian ripozon.
Jen ni, denove vin preĝantaj
pri l'virto kaj forto
por la hodiaŭan agadon kapabli fini
kaj korekti kion ĝis ĉi momento ni pekis.
Disinjoro, donacu al ni la helpon bezonatan,
venu al niaj horoj,
estu nia forto, subteno kaj defendo.
Amen.

PREĜO POST LA PEREINTA RIKOLTO

Ho, Disinjoro,
kiu vidas la terkulturiston
perdinta la ĉi jaran rikolton.
Li semis sur sia kampo, en vilaĝo,
aŭ en oficejo, en urbo,
li laboris per sia ilaro,
sur la tero aŭ en oficejo, ĉe skribotablo…
Alvenis la aŭtuno, sed la rikolto forestis.
Li perdis ĉion kion li havis.
Disinjoro, mi vin alpreĝas,
donu al li novan semon,
ankoraŭ da suno kaj forto
por denove povi rekomenci.
Poste li semos kaj rikoltos.
En lian koron enversu ĝojon,
amon al li donacu,
por ke dum ĝojo kaj malĝojo li glorkantu al vi
fidante al via amo kaj via protekto.
Amen.

PENSOJ DE PATRINO TEREZA

Mia plej granda premio estas ami Jesuon. Li estas por mi ĉio. Li estas mia vivo, mia amo, mia premio, mia ĉio.

Hodiaŭ vivi kristane estas tre malfacile kaj tio ne eblas sen preĝo.

Nur tiu kiu preĝas kaj amas per pura koro povas trovi Dion.

Jen nia vokiĝo: per niaj vivoj kaj atestoj ni igu Dion ĉeesta en la hodiaŭa mondo.

Dia parolas en la silento de la koro.

Por ke ni povu esti kapablaj preĝi, ni kapablu aŭskulti.

Ni estu fidelaj preĝantoj de la rozario. Ni preĝu ĝin pie. Ne gravas kiom da rozariobidoj ni preĝas, samkiel ne gravas kiom da tempo ni uzas por la preĝo, gravas la pieco kaj la maniero per kiu ni preĝas ĝin.

Ni posedas nenion kaj sekve ni ne devas zorgi pri io. Se vi pli posedas, vi devas pli zorgi, se vi malpli posedas, vi estas pli libera. Malriĉo estas por mi libero.

Feliĉo estas bezono, granda donaco por aliaj, sed ankaŭ por ni mem, fajrero de amo kiu flamas. Ĝojo estas preĝo, ĝojo estas forto, ĝojo estas amo el servado.

Ni ĉiuj estus sanktaj, se ni bone plenumus nian laboron.

Rigardu tabernaklon – komprenu la signon de la amo. Demandu vin: Ĉu mi komprenas tion? Ĉu mia koro estas tiom pura por vidi ene Jesuon? Trovi Jesuon signifas trovi pacon. Tempo kiun ni uzas por ĉiutaga preĝo kaj dialogo kun Dio estas plej valora parto de la tago.

Ĉiu inter ni estas kreita por iĝi sankta. Ni estas kreitaj por la sama celo: ami kaj esti amata. Ni estas kreitaj por grandaj aferoj. Dio montras sian grandecon uzante nian neniecon. Mi ĝojas ĉar vi vidas Jesuon en mi, ĉar ankaŭ mi vidas Lin en vi. Ekzistas unu afero kiun ni ĉiuj devas apliki: superregi niajn timojn.

Ne gravas kiom vi laboras, sed gravas kiom da amo vi investas en tio kion vi laboras kaj kiel vi tion donacas al aliaj. Provu ne juĝi la homojn. Se vi prijuĝas ilin, vi ne transdonas la amon.

Se ni deziras konkeri la mondon, ni ne povas tion fari per bomboj. Ni konkeru la mondon per nia amo. Ni interplektu propran vivon per ĉenoj de ofero kaj amo, ĉar tiel eblas konkeri la mondon.

Labori aŭ vivi sen amo estas sklaveco.

Laŭ la nacieco mi estas albanino. Mi havas hindan ŝtatanecon. Mi estas katolika monaĥino. Laŭ humileco mi apartenas al la tuta mondo. Laŭ koro mi apartenas al la koro de Jesuo.

Ekzistas medikamentoj por preskaŭ ĉiuj malsanoj. Sed mankas bonaj manoj por servado kaj koroj por amo. Ni

ne kredas ke iam oni povos resanigi la strangan malsanon – senti sin neamata. Neniu malsano, eĉ lepro, povas tiel deformigi la homon ke ni ne povu rekoni fraton aŭ fratinon, eĉ pli Jesuon suferantan.

Ĉiu tage okazas iu miraklo. Ne ekzistas tago dum kiu ne alvenas ia signo de la Dia atento, signo de Lia amo. La plej granda miraklo estas tiu ke Dio uzas malfortajn estaĵojn kiaj ni estas. Li uzas nin por sia agado. Permesu al Dio ke li uzu vin sen via permeso.

Ni posedas nenion kaj sekve ni ne devas zorgi pri io. Se vi pli posedas, vi devas pli zorgi, se vi malpli posedas, vi estas pli libera. Malriĉo estas por mi libero. Tio ne estas pentofaro, sed feliĉa libero. Ni ne povas permesi ke Dia infano mortu kiel besto, en fluaĵo de malpura akvo. Feliĉo estas bezono,granda donaco por aliaj, sed ankaŭ por ni mem, fajrero de amo kiu flamas. Ĝojo estas preĝo, ĝojo estas forto, ĝojo estas amo el servado.

La Eklezio deziras renovigi la hodiaŭan mondon. Sed la renovigo ne konsistas el la ekstera ŝanĝo de la vestaĵo, sed unuavice el la interna, funda ŝanĝo de la homo per la Dia graco.

Dio decidas pri ĉio. Li decidas kiam ni naskiĝos kaj kiam ni mortos. Ni devas Lin fidi kaj ĝis la morto plenumi la laboron al kiu Li invitis nin.

Multaj en la mondo sopiras pri panero, sed multe pli sopiras pri iom da amo. Ekzistas sopiro pri amo, samkiel ekzistas malsato pri Dio.

Sur la muro de la porinfana domo en Kolkato estas skribite:

Trovu tempon por meditado,
tio estas fonto de forto.
Trovu tempon por preĝo,
tio estas plej granda forto sur la tero.
Trovu tempon por rido,
tio estas melodio de la animo
Trovu tempon por ludo,
tio estas sekreto de la juneco
Trovu tempon por amo,
tio estas donaco de la Dia privilegio.
Trovu tempon por pridonacado,
la tago estas tro mallonga por esti egoisma.
Trovu tempon por legado,
tio estas fonto de saĝo.
Trovu tempon por amikeco,
tio estas vojo al feliĉo.
Trovu tempon por laboro,
tio estas pago de sukceso.
Trovu tempon por mizerikordo,
estas ŝlosilo por la ĉielo.

VIVO ESTAS

Vivo estas okazo – spertu ĝin
Vivo estas belo – admiru ĝin
Vivo estas revo - faru ĝin realo
Vivo estas defio – alfrontu ĝin
Vivo estas tasko – plenumu ĝin
Vivo estas ludo – ludu
Vivo estas valoro – flegu ĝin
Vivo estas trezoro – gardu ĝin
Vivo estas amo - ĝuu ĝin
Vivo estas mistero – perceptu ĝin
Vivo estas promeso - plenumu ĝin
Vivo estas malĝojo - venku ĝin
Vivo estas himno – kantu ĝin
Vivo estas lukto – akceptu ĝin
Vivo estas tragedio – batalu kontraŭ ĝi
Vivo estas aventuro - frontu ĝin
Vivo estas fortuno – gajnu ĝin
Vivo estas vivo - defendu ĝin

*

Frukto de silento estas preĝo.
Frukto de preĝo estas kredo.
Frukto de kredo estas amo.
Frukto de amo estas servado.
Frukto de servado estas paco.

VIRINOJ

Ĉiam memoru ke la haŭto faltiĝas,
la haroj iĝas blankaj,
la tagoj aliiĝas al jaroj…
Sed tio kio gravas ne ŝanĝiĝas;
via forto kaj via konvinkiĝo ne havas aĝon.
Via spirito estas la gluo de ĉia ajn araneaĵo.
Malantaŭ ĉiu alvena linio staras ekira linio.
Malantaŭ ĉiu sukceso estas alia elreviĝo.
Dum vi estas vivanta, sentu vin viva.
Se al vi mankas tio, kion vi faris, denove ĝin faru.
Ne vivu el flaviĝintaj fotografaĵoj…
Insistu, eĉ se ĉiuj atendas ke vi forlasos.
Ne lasu rustiĝi la feron, kiu estas en vi.
Agu tiel, ke anstataŭ kompaton oni havu al vi respekton.
Kiam pro la jaroj vi ne povos kuri, marŝu rapide.
Kiam vi ne povos marŝi rapide, piediru.
Kiam vi ne povos piediri, utiligu lambastonon.
Sed neniam vin detenu!